

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1976 5

KULTURAJ KAJEROJ

1976 SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Islando : ĉu Hiperboreujo ?

Malnova skribarto en Sud-Ameriko

Transdono de la vivo

El la mil kaj unu noktoj

« Eta amata virino, kun parfumo de verbeno »...

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Varmis, varmegis en julio. Pro tio verŝajne la etoso ne estis kutima. Pli ŝatata estis enombra senmoveco ol vigleco. La ĉeestantoj estis tre multnombraj kaj pro tio ankaŭ la eksterlandanoj pli emis al grupetiĝo ol al partopreno en la komunaj aranĝoj. Ne nur la terkulturistoj viktimiĝis pro la tro granda sekeco ! Tamen la ĉeestintaj geinstruistoj kunportis al Pollando sufiĉe da pozitivaj ecoj por akceptigi en la internacia Renkonto de Freinet-instruistoj esperanton, kiel laborlingvon.

Kvankam daŭris la sekeco, kvankam la nombro da partoprenantoj estis malpli granda, la du sekvaj periodoj estis sukcesplenaj. Interesaj prelegoj (el kiuj kelkaj estos publikigitaj en la revuo) valoraj kursoj allogis la pli multon el la ĉeestantaro. Dankindaj estas la prelegintoj kaj instruintoj, kiuj faris grandan laboron por interesi la aŭskultantojn kaj lernantojn. Multaj riĉigis siajn konojn pri « Regionaj kostumoj », « Medicinaj plantoj », « Moderna pentrado », « Krizo de la industria socio », « Novaj energifontoj », « Klasifiko de la plantoj », plezure vojaĝis tra Kanado kaj Islando, lernis pri « Interlingvistiko », « Karakteriologio », « Volapük », « Diversaj gramatikaj malfacilaĵoj de Esperanto », sekvis la preleganton, kiu diris : « Rigardu la ĉielon ». La sukceson de la kursoj montras la rezultoj de la ekzamenoj.

Kaj venontjare ? La konsilio kunvenos fine de oktobro por ne nur konstati la rezultojn de la pasinta somero sed ankaŭ prepari la programon de1977. Ĉu ŝanĝiĝos kelkaj eroj ? Eble, ĉar sugestoj estis faritaj. Ĉiukaze tiu programo disvolviĝos en kastelo, kies unua etaĝo estos tute renovigita ĉar la financaj rezultoj de 1976 permesas tiun renovigon.

Ĝis venonta somero.

Antaŭ 25 jaroj, la 16-an de septembro 1951, naskiĝis la kooperativa asocio « Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj », kiu aĉetis la kastelon Grésillon kaj daŭre organizas tie studperiodojn.

La unuan fojon en julio 1952 Grésillon malfermis siajn pordojn al esperantistoj.

1977 jubilea jaro.

Esperanto tra la Mondo ★

La Universala Kongreso en Ateno

Ĉirkaŭ 1 350 personoj el 51 landoj aliĝis al la 61a Universala Kongreso en Ateno, kiu disvolviĝis en bonaj kondiĉoj, parte dank'al la efika apogo de oficialaj kaj urbaj instancoj.

Estas rimarkinde ke S-ro M'bow, ĝenerala direktoro de UNESKO, sendis simpatian mesaĝon. Leteroj estis ricevitaj de internaciaj, interŝtataj organismoj, ministroj.

Registaraj reprezentantoj de 13 landoj ĉeestis la inaŭguron, kaj parolis, interalie, S-ro Panajotopulos, vic ministro por komerco de Grekio. Ĉeestis S-ro Pignot, estro de la traduka servo de Eŭropa Ekonomia Komunumo en Bruselo, ktp...

La komitato de U.E.A. akceptis la aliĝojn de Korea Esperanto-Asocio (Suda Koreo), de la Centra Laborrondo Esperanto de Germana Demokratia Respubliko kaj de Asocio de Esperantistoj en Slovakio.

Kiel kutime, riĉa programo de ĝenerala kaj fakaj kunvenoj, prelegoj de somera universitato, distraj vesperoj, estis proponitaj al la ĉeestantaro.

Eniris la literaturajn konkursojn (nur nun pri originala literaturo), 61 eroj, kiuj venis de 31 aŭtoroj el 14 landoj. La unua rezolucio de la kongreso, rilatis al la kongresa temo : « La internacia kunlaboro de ŝtatoj sur regiona nivelo », kaj substrekis la valoron de Esperanto por tiu kunlaboro. La dua rezolucio gratulis UNESKO pro la 30a datreveno de ĝia fondiĝo (4a de Novembro 1946). La tria rezolucio, memorigante pri la « principaro de Frosta vallen » por la informado pri la internacia lingvo, rekomendas al la esperantistoj daŭrajn evoluigojn kaj aplikon de modernaj kaj trafaj metodoj de informado kaj interŝanĝon de ideoj sur tiu kampo.

Jam, la kongreso en Rejkjaviko preparĝas...

La prepara komitato por la Universala Kongreso 1977 eldonis belegan « Unua Bulteno » —n pri Islando. Ni sugestas al la esperantistaj centroj kaj kluboj uzi tiun bele-presitan kaj ilustritan broŝuron por informado (petu ĝin kvantete al U.E.A., pere de la naciaj asocioj).

Junularaj Kongresoj : 400 en Tesaloniko (1976), kiom en Poitiers (1977) ?

Preskaŭ 400 gejunuloj venis en Tesaloniko por la tradicia kongreso-renkonto de la asocio TEJO.

La prezidantino de la nova estraro estas Claude Nourmont-Moon (Francio).

Pro la malproksimeco de Islando, la kongreso-renkonto 1977 okazos en Poitiers, Francio (9 — 16a de Aŭgusto).

La S.A.T. -anoj kongresis en Gotenburgo

La jara Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda arigis 300 parto-prenantojn el 21 landoj, fine de Julio, en Gotenburgo (Svedio). Pluraj fakaj asocioj aparte kunvenis.

Okazis inform-kunveno pri la svedaj sindikatoj, kun la reprezentantoj de la urbaj sindikatoj.

La fina rezolucio substrekas ĝuste la agadon por Esperanto en la sindikatoj, memorigas pri la finakto de la Internacia Konferenco por Sekureco en Helsinki, kondamnas la uzadon de perforto en la interpopolaj rilatoj, genocidon, rasismon kaj pledas por mondvasta malarmado.

Universitataj Semajnoj en Primoŝteno

La « Societo pri lingvo-transpaŝa eŭropa interkompreno » okazigis de la 16a ĝis la 29a de Julio en Primoŝteno (Jugoslavio), Somerajn Internaciajn Universitatajn Semajnojn. Tiu manifestacio estis plurlingva, sed la ĉefa celo estis enigi la internacian lingvon en la aron de sciencaj kongresaj lingvoj.

Entute prelegis 26 docentoj por 45 lekcioj. La celo estis bone atingita. Libroj kun uzo de Esperanto estos eldonita.

Kursoj en la Universitato de San Francisko

Por la sepa sinsekva somero, Prof. William Auld gvidis oficialajn trisemajnajn esperanto-kursojn ĉe la Ŝtata Universitato de San Francisko. Kvar kursoj estis starigitaj kaj 35 studentoj aliĝis al la kursaro, por kiu ili ricevis tri notojn de diplom-kredito. Multaj antaŭaj studentoj jam instruas Esperanton en lernejoj aŭ aliaj institucioj, notinde en Usono.

La internacia blindul-kongreso

97 nevidantaj esperantistoj el 16 eŭropaj landoj partoprenis la ĉijaran kongreson en porblindula ferio-hejmo en Stubenberg (Aŭstrio). La temo de la kongreso rilatis ĉefe al la profesioj de la blinduloj en la mondo.

La kongreso 1977 okazos en Oslo.

Rimarkinda revuo

La numero 4 — 1976 de « Hungara Vivo » estas dediĉita al la esperanta libraro. Tiu revuo aperigas altnivelajn artikolojn, ĉefe pri nia esperanto-literaturo. La temo de la numero 2 — 1976 estis « scienc-fikcia literaturo ». Aliaj specialaj numeroj aperis.

Kompreneble, aperas ankaŭ interesaj artikoloj aŭ novaĵoj pri la hungara kulturo. Entute, tia revuo honorigas nian movadon.

Novaj eldonaĵoj

— « Vage tra la dimensioj » de Konisi Gaku. Scienc-fikciaj originalaj noveloj.

— « Forkaptita » de Stevenson. Traduko de A. Goodheir.

— « Ĉu vi kuiras ĉine ? ». Detektivromano originale verkita en Esperanto de Johan Valano.

— Reeldono : « Angla Antologio (1000 - 1800) », redaktita de Auld kaj Rossetti.

— Ni memorigas la reeldonon de la originalaj verkoj de Jean Forge : « Abismoj », « Saltego trans jarmiloj », « Mr Tot aĉetas mil okulojn », « La verda raketo ».

— Ni ricevis kaj kontentige uzis en Grésillon la nove eldonitan « Kvitanclibreton » tute en Esperanto. Informoj : Mondkomerca Eldonejo Esperantista, Poŝtokesto 25041, Rotterdam 3003, Nederlando.

ISLANDO : ĉu Hiperboreujo ?

En tiu tempo, malproksime, tre malproksime, en la pasinteco, la paŝtisto de Sumero, de Egiptujo, de Jeriĥo, observis la Grandan Drivadon de la steloj : tiun tajdon de sunoj, de lunoj, de scintilantaj fajroj. kiuj turniĝis, ĉiun tagon, ĉiun nokton, ĉirkaŭ lia erikejo — enprofundiĝis ĉe la horizonto — rekomencis sian kuron ĉe la alia bordo.

Li mem estis en la Centro

Lia tendo, lia kabano, la akvofonto, la urbo, la reĝo, la templo, lia propra tribo estis la Centro — kaj ĉiuj orboj desegniĝis ĉirkaŭ li : la punkto fiksa kaj kerna.

Ekzistis alia punkto fiksa videbla. Unu nura. La signal lumo de tio, kion oni nomas la Polusa Stelo.

Inter tiuj du punktoj, la inteligenteco tiris rektan linion — kiu montriĝis la akso de la mondo — kaj la unua el la astronomiaj spekulativoj, al kiuj alkroĉiĝis nenombreblaj noktoj de meditadoj.

La tero mem estis konceptita kiel plata disko ; en ĝia centro la lando de la observanto ; ĉirkaŭe nekonataj regionoj, kiujn oni opiniis loĝataj de fabelaj faŭnoj kaj de sovaĝaj popoloj — malsuperaj. Transe : nenio — aŭ plejmalbone : la Granda Origina Abismo, la Muĝantaj Te nebroj, la Kaoso de antaŭ la dioj.

Dum dekoj da jarcentoj, neniu geografia realaĵo trudiĝis al tiu vidado de la universo. Multe pli malfrue la Pitagoristoj prezentis la Teron kiel globon, sed la popolamaso ne sekvis

La fikseco de la Polusa Stelo, malkovrita de la unuaj observantoj, estas plej grava fakto : ĉio moviĝis en la universo, ĉio turniĝis, ĉio ŝanĝiĝis — krom tiu punkto eksterordinara kaj stabila.

Oni igis ĝin pivoto de la mondo

Plie ĝi respondis al la plej profundaj aspiroj de la homoj : Tiu malproksima flamo estis la ĉiela atestanto de unu « transcendo », indiferenta al la fluktuadoj de la spaco kaj de la tempo. Tie ĉi sendube estas la origino de tiu mito, kiun la Grekoj diris « Hiperborea », kaj kiun oni trovas ĉe aliaj popoloj. Laŭ tiu mito : Ekzistis, ie, en la Nordo (transe de Boreo, transe de nordventaj fontoj, do, tre malproksime al Nordo mirinda lando ; tiu Edeno (cetere neatingebla pro la Hiperboreaj montoj, el kiuj fluas riveroj kaj tempo) estis loĝata de sankta raso, de Superhomaro, kiu konis nek la malsanon, nek la maljunecon, nek la morton — sed kiu vivis, sen laboro nek batalo, en stato de Saĝeco kaj Feliĉeco eterna — ĝi ankaŭ sciis translokiĝi aere kaj malkovri Trezorojn.

La greka interpreto de Hiperboreujo penetris en la Mediteranean mondon — donis bildon de la universo — kaj igas pensi, ke la Grekoj havis iun scion de la norda mondo. Teksto (400 ant. K.) cetere precizigas, ke la Feliĉa Hiperboreujo havas 6-monatan tagon kaj 6-monatan nokton.

La ĉefa rolo de tiu mito apartenas al Apolono, la internacia dio-Suno ; li naskiĝis en Delos kun sia fratino Artemisa (filo de la ĉiela Zeŭso kaj de Leto-a, la Nokto — Leto, kiu naskiĝis en Hiperboreujo kaj tien reiras por eskapi Hera). Tuj de sia naskiĝo Apolono flugas al Hiperboreujo sur ĉaro tirata de cignoj (la sovaĝa cigno estas la reĝo de la nordaj bestoj). Li restadas ĉi tie dum kelkaj monatoj. Poste, kiam li forlasas Delfon, li revenas en la Nordon kaj ĉiun nokton li kantas siajn himnojn akompanante sin per sia liro. La destino kondukis Orfeon Perseon kaj Heraklon en Hiperboreujon.

Herodoto notis, ke, en Delos, estis tomboj de Hiperboreaj Virgulinoj.

Fakte, jam de longe, komercaj vojoj trairis Eŭropon kaj transportis potaĵojn, ellaboritajn objektojn, peltojn, metalojn : oro, arĝento, bronzo kaj sukceno.

Se la filozofoj imagis unu mondon konforman al siaj internaj revoj, estis aliaj homoj, pli modestaj, kiuj plie sciis pri la reala figuro de la Tero. Estis la komercistoj. Ili organizis karavanojn, kargis ŝipojn, uzis la Polusan kiel ĉefan gvidosignon dum la ekspedicioj. Por ili Hiperboreoj estis pli eventualaj klientoj, ol senmortemuloj kaj superhomoj.

La unuaj ŝipanoj en Mediteraneo estis Egiptoj kaj Kretanoj. De la 17-a jarcento a.K. ĝis la 15-a, Kreto estas la unua mar-potenco ; ĝiaj ŝipoj grand-komercas kun Egiptujo, Malgranda Azio, kontinenta Grekujo, Cirenio, Italujo, Sicilio.



Verŝajne, ili laŭiris la bordojn de Provenco kaj Hispanujo kaj certe iris pli malproksimen al Oceano.


Ĉirkaŭ -1400 la eksplodo de la vulkano de Santorin detruis Kreton kaj neniigis ĝian floton. Tiam la Fenicoj iĝis mastroj de la maro. Tiuj Semidoj, de longe instalitaj sur la Siriaj bordoj, estis fondintaj la urbojn Biblos, Sidon, Tyr, de kiuj Ezekielo laŭdis la riĉabundon. Ili traplugas Mediteraneon, okupas la Kretajn faktoriojn kaj okcidente celas Sardujon, Sicilion, Balearojn, Iberian bordon. Ili trairas la (estontajn) Kolonojn de Heraklo, atingas Oceanon, kreas la urbon Gades (Kadizo), hispanan atlantikan havenurbon, en la riĉa Tarŝiŝo.

Kun la princino Didon-a ili instaliĝas en Tunizio kaj kreas Kartagon. La Fenicoj aĉetas oron en Maroko, arĝenton en Hispanujo, la vegetalan purpuron en Kanariaj Insuloj, eburon kaj sklavojn en Afriko, stanon en Kornvalo kaj Kimrujo, sukcenon pli norde. Tio ĉi supozas navigadojn ĝis plejnordajn limojn de la tiama konata mondo. Oni konas la periplon de Hamon (6-a jarcento a.K.) laŭ la Afrikaj bordoj ĝis la vulkano Kameruno. Sed restis nenio pri la samtempa ekspedicio de Hamilcon sur la nordaj stano-vojoj.

Grekujo atakis Kartagon kaj Romo ĝin detruis

Masilio (la antikva Marsejlo), posta al Kartago, estis fondita en -600 de la Malgrandaziaj Grekoj venintaj el la malproksima Foceujo. Masilio rapide progresis ; ĝi havis rimarkindan strategian situon sude de Keltujo, ekstreme de la Rodana Valo, inter Sicilio kaj la Gibraltar-markolo ; ĝi kontrolis la marajn vojojn al Iberio kaj Oceano kaj la terajn vojojn al Nordo.

Ekzistis pasejo (markita sur la mapo de Eratosteno -ĉirkaŭ -275 -195) de la Nigra Maro al la Balta Maro laŭ la Rusujaj riveregoj. Tra nordaj Keltujo kaj Germanio, la karavanoj estis notintaj la riveregojn, la travadejojn, la fontojn, la pasejojn, la arbarojn, la danĝerojn, la etapojn la proviantejojn... Sed ankaŭ la trairitajn landojn, la kutimojn, la ĉefojn, la trair-impostojn. Ankaŭ la farotajn donacojn.



La sukceno-vojo laŭiris la Rodano-valon, iris ĝis la landoj de la Frizonoj kaj de la Cimbroj (Holando, Ŝlesvigo, Danlando) kaj haltis ĉe marbordo ; ĉi tie la maro deĵetis grandkvante sukcenon, kiun la loĝantoj uzis kiel brulaĵon en siaj mizeraj kabanoj.

Post la falo de Kartago, Masilio, finfine mastro de Mediteraneo, organizas du ekspediciojn : La unua laŭ la Afrikaj bordoj : ĝi atingis la enfluejon de la Kretes (la Senegalo), la granda riverego de la krokodiloj kaj hipopotamoj ; tiam oni pensis, ke ĉi tie troviĝas la fontoj de Nilo, kiu tiel fluis de la ekstera oceano ĝis Mediteraneo.

La alia ekspedicio al la Hiperboreaj maroj sub estrado de Piteas

Mapoj kaj raportoj pri tiu ekspedicio tute malaperis. Sed, tri jarcentoj pli poste, Polibio kaj Strabon-o el tio publikigis kelkajn eltiraĵojn.

La priskriboj de la antaŭaj navigistoj parolis pri nebuloj, abismoj, tenebroj, malprecizaj formoj ; ili priskribis la starigitajn ŝtonojn de la melankoliaj Bretoniaj erikejoj ; ili elvokis la tieajn legendajn ramistojn, kiuj konduis longajn barkojn pli nigrajn ol la nokto, ŝajne malplenajn, sed ŝarĝitajn ĝis rando je la pezo de la Spirblovoj. Tiuj ŝipoj transiris la Oceanon ĝis la Feliĉa Insulo.

Unu unua signalo anoncis maron speciale malfavoran al la homoj : transe de la kabo Kalbion estis insulo ; oni nomis ĝin Occimor-Ouxiame aŭ eĉ Thule. Estos la Uxantis de la Romianoj ; la Enez Heussa de la — estontaj — Bretonoj ; Ouessant (Uesanto).

Dum liaj amikoj festenas, malplenigas pokalojn, tostas al la sukceso de la ekpedicio, Piteas rigardas, en la haveno, sian boaton, kiu malpacience provas eskapi al siaj kabloj. Estis ĉirkaŭ -340.

Piteas, greka navigisto, matematikisto, astronomo kaj geografo, naskiĝis en Masilio. Li determinis la latitudon de Masilio, kaj la oblikvecon de la ekliptiko. Kun la Pitagoristoj kaj Platono, li konsideris, ke la Tero estas sfero. Li konis la rilatojn inter Luno kaj tajdoj.

Piteas forlasas Masilion, laŭsekvas la bordojn de la (estonta) Provenco, tiujn de Iberio ; pasante, li salutas la faktoriojn Rhodanusia, Narbo, Tarrace, Sagonta kaj fine Himeroscopion kaj Alome, la lastajn grekajn observejojn sur tiuj marbordoj. Li pasas inter Kalpe kaj Abyla (Gibraltar) kaj fine ŝipas al la libera maro : Okeanos.

De tiam estas la longaj huloj de Atlantiko, kiuj suprenlevas la pruon de la ŝipo. De malproksime la maristoj vidas Gadir, la atlantikan Punikan avangardon, la Sanktan Kabon (s-ta Vincento) ; laŭsekvas la marbordojn de Iberio kaj Kimrujo. Pli supre, du fiksaj gvido-signoj : la kabo Kalbion (Pto de Raz) kaj Occimor. Uesanto estis la unua el Thule-oj (en kelta lingvo Thul-al = Nordo). Tiu insulo longtempe estis la ekstrema punkto por la ekspedicioj. Por Piteas, ĝi ne plu estis la limo de la mondo. Tamen, transe de tiu punkto, oni povas nur supozi lian kurson al Nordo : Kornvalo, Kasiretitaj Insuloj. Poste, ĉirkaŭiri la anglan bordon, preteriri Ictis (Wight-insulon) kaj pli norde, trairi la pasejon inter la hodiaŭaj Dungeness kaj Gris-Nez. Transe, la maro estis pli griza, pli hula sub nebul-arkipelagoj kaj senfinaj krepuskoj. La kruda bizo forpelis ŝprucaĵojn da marŝaŭmoj sur la ŝipon.

La mastaro grincis. La Grekoj, « je pli ol 9 mil stadioj » de siaj plaĝoj kaj olivujoj, frosteme grupiĝis ĉe la ŝipantaŭaĵo, malkovris sian unuan grandan balencon kaj ekkriis : « ĝi blovas ! ».

Piteas daŭrigas sian kurson al la probabla Hiperboreujo, al la legenda loĝejo de Suno. La tagoj longiĝas pli kaj pli, dum la tenebroj malpli kaj malpli daŭras. La Granda Ursino suprenleviĝas al la centro de la ĉielo. Pireas, tiu mirinda navigisto, notas, ke la Polusa ne tute ekzakte indikas la nordon. La proksima ŝiphaltejo estas la Orkas-promontoro (la Orkadoj). De ĉi tie, 7-taga vojaĝo por atingi aliajn insulojn (la Feroajn ?) Kaj de tiuj insuloj denove 5-taga vojaĝo pli norden...

Tiam estas nova tero, kiu elmergas el la senfina oceano : « tie ĉi la daŭro de la lumo estas 24-hora el 24 horoj kaj la suno ne forlasas la horizonton ».

« Estas la lasta tero de la loĝata mondo »

Kaj ankaŭ la primitiva kuniĝo de la elementoj : la neĝaj montoj, kie drivas la glaciblokoj, bruske bolas pro ekfrapo de inkandeskaj masoj. Kaj transe, estis plu nenio · nenio preciza, nenio identigebla ; ia gelateno, unu stranga materialo, kiu estas nek akvo, nek aero, nek glacio ; sur kiu oni povas nek paŝi, nek navigi, kaj kiun oni nomis : « la pulmo de la maro ». Post unu taga navigado pli norden, oni renkontas la solidan akvon. Ĉi-foje estas la limoj de la mondo, la kuŝejo de Suno, la fino de la misteraj vojaĝoj de Apolono-Helios ; la Insulo hiperborea Thule. La Thule de Piteas : Islando.

El la libro « Oro de Islando », de Samivel.

MALNOVA SKRIBARTO EN SUD-AMERIKO

Antaŭ-Inkaa Skribo

La Inkaa Imperio fascinis la tutmondajn historiistojn. Tamen la arkeologiaj malkovroj pruvis, ke malnomada civilizacio kun funebraj ritoj, kaj eĉ grandaj altnivelaj kulturoj disfloris longjarcente antaŭ la ekzisto de la Inkaa Imperio, kiu nutriĝis je iliaj scioj. Plie, malgraŭ ilia prestiĝo, oni ĉiam riproĉis al la Inkaj Princoj, ke ili ne atingis la stadion de la Skribo.

(Samperiode Meksikio havis librojn faritajn el longaj paperaj bendoj akordione falditaj, kaj dank'al kiuj oni povis identigi la Aztekan Skribon).

En la 16-a kaj 17-a jarcentoj la hispanaj okupantoj certigis, ke la Peruanoj havis nek literojn nek skribon. Tamen la hispanaj kronikistoj raportis pri leĝoj, testamentoj, ordonoj, historiaj eventoj kaj mesaĝoj pentritaj sur ŝtofoj. Estas certe, ke la teksindustrio larĝe disvolviĝis en la pra-kolombiaj tempoj kaj ke la ŝtofoj ĉiam akompanis la funebrajn ritojn.

La funebraj « Fardoj »

En 1927, la perua arkeologo Julio C. Tello malkovris en dezerta duoninsulo, situa je 15 km. de la haveno Pisco (en departemento de Ica), la Nekropolojn de Paracas.

Tamen, neniu ruinaĵo de palaco, de templo, de urbo indikis, ke popolo kaj ĝiaj ĉefoj estis ĉi tie vivintaj, 300 aŭ 200 jarojn antaŭ nia erao. Tiu « urbo de mortintoj » entenis nur mumiojn de maljunuloj, kiuj estis vivintaj kaj regintaj en aliaj lokoj. Neniu juna viro, neniu junulo, neniu virino neniu infano ĉi tie kuŝis. Estis nur maljunuloj.

La funebraj « Fardoj » eltombigitaj el la sabloj estas iaj sarkofagoj ovoidaj el tolo ; ĝenerale ĉiu Fardo entenas unu mumion ; kelkfoje plurajn aŭ, alifoje, ili estas nur « simbola entombigo », kun neniu. Tiuj maljunulaj mumioj estas nudaj ; ili sidas kiel infanoj antaŭ la naskiĝo ; kvazaŭ ili estus revenintaj al sia primitiva etapo.

Diverskoloraj toloj envolvis la mumion. Interne oni trovis, kun la mumio, plej diversajn aĵojn : pecojn de blanka kotonaĵo, pentritajn aŭ broditajn tunikojn el lano aŭ kotono tinkturitaj, mallongajn tunikojn el plumoj de papagoj, matojn kaj larĝmaŝajn retojn el kanoj. Oni trovis ankaŭ saketojn entenantajn magiajn grajnojn aŭ foliojn de kokao ; maizo-spikojn, kaj kelkfoje unu felon de vulpo, unu hundon aŭ birdon mumiigitan ; estis ankaŭ juveloj, ornamaĵoj, fluto el osto aŭ kano...

Kelkaj Fardoj havis « falsan kapon » el ŝtofo aŭ el hakita ligno.

La « Mantoj » de la Paracas-Nekropoloj

La « Mantoj » estas la grandaj rektangulaj pecoj de kotonaĵo, kiuj envolvis la mumiojn. Sur tiuj Mantoj, kiel sur la egiptaj sarkofagoj, figuras bildoj : bildoj de dioj, bildoj de felisoj, bildoj de la mortinto mem kun siaj vestoj kaj insignoj.

Tiuj bildoj estas akompanataj de signoj : de « Pallar-signoj ».



La Pallar-signoj
Pallar-o estas perua fazeolo

En 1938, la arkeologo R. Larco Hoyle esprimis la opinion, ke la desegnoj de Pallar-oj, kiuj ornamas la ceramikon Mochica estas skriba sistemo. .S-ro Tello kaj Rebecca Carrion Cachot ankaŭ notis la ĉeeston de pallaroj sur la teksaĵoj de Paracas. Sed la sciencula medio restis indiferenta kaj portis neniun atenton al tiuj desegnoj.

Inter la 429 funebraj Fardoj trovitaj de S-ro Tello, nur 41 enhavas broditajn tolojn. Inter tiuj ĉi, 39 toloj (por 13 mumioj) portas la Pallar-signon ; ĉiuj pallaroj estas du-kolore broditaj kaj

la ĝermo de la fazeolo estas plantita jen laŭ unu direkto, jen laŭ alia, laŭ preciza intenco. Fine, miloj da kopiitaj pallar-signoj donis liston de 303 malsamaj desegnoj, al kiuj oni devas aldoni la dudekuman numeradan notadon (ja, oni havas du manojn, du piedojn ; tio donas 20 fingrojn por pli facile kalkuli).

Tamen multajn signoj restis studotaj kaj tradukotaj.

En 1964, Fraŭlino V. de la Jara elstudis, en la muzeo de Lima, unu el tiuj Mantoj kaj raportis interesajn notojn : Tiu Manto havas, sur ruĝa fono, nigran broditan damtabulon ĉirkaŭatan de brodita bendo : 114 broditaj biloj reprezentas eminentulon portantan diademon kaj insignojn ; ĉiuj tiuj bildoj estas identaj sed la pozicio de la persono kaj la koloroj varias ; oni rimarkas, ke tiuj varioj ripetiĝas laŭ oblikva ritmo. (Tamen la manko de perspektivo igis malfacila la interpretadon de tiuj scenoj).

Sur ĉiu bildo, apud la persono, estas pallar-signoj diversmaniere arigitaj : 513 broditaj signoj donas 79 malsamajn desegnojn. Dua tolo, de la sama Fardo, (kiu entenis 9 tolojn) havis la samajn desegnojn kiel la unua, sed la koloroj estis inversigitaj (fono nigra kun ruĝa damtabulo ; inversaj koloroj ankaŭ ĉe la signoj). Plie fiŝoj ĉirkaŭas la okulojn de la personoj, kiuj ornamas la borderaĵon. Estas ankaŭ multaj pallaroj : entute 581 signoj el kiuj 77 estas malsamaj (kiam la sama signo ripetiĝas sur la tuta tolo, oni pensas, ke temas pri magia sorĉkanto). Entute, sur la du Mantoj, F-ino de la Jara notis 213 similajn bildojn kaj 213 malsamajn signojn.

Pli poste oni rilatigis la poziciojn de la Pallaroj al la movoj de la Suno kaj al fazoj de la Luno. Oni pensis, ke tiuj pallar-signoj estas ĝermada signo kaj korespondas al kalendaro bazita sur la ĝermado aŭ kreskado de kelkaj nutraj plantoj. (Cetere, la antikvaj libroj raportas, ke, pli poste, la Inkaoj mem kalkulis la horon laŭ la tempo necesa por la kulturo de la terpomo). Tiu Pallar-skribo ŝajnas, laŭ niaj hodiaŭaj konoj, la plej antikva Skribo en Ameriko.

(Daŭrigota)



R.I.D.E.F. 76 EN POLLANDO

Grava sukceso por esperanto

La unuan fojon verŝajne en historio de la Esperanto-movado, tre grava internacia pedagogia asocio adoptis Esperanton, kiel unu el siaj ĉefaj laborlingvoj.

Tiu-ĉi asocio estas la FIMEM (Internacia Federacio de la Movadoj por Moderna Edukado), kiu arigas asociojn el 38 landoj kaj ĉiujare organizas Internacian Pedagogian Kongreson, la R.I.D.E.F. (Internacia Renkontiĝo De Freinet Edukistoj).

Dum la ok unuaj RIDEF, oni ne nombris pli ol du aŭ tri geesperantistojn inter la 150 aŭ 200 partoprenantoj. La lingvaj problemoj estis ĉiam gravaj kaj neniun solvon oni antaŭvidis.

Sed, en 1975, esperantista grupo de la FIMEM alprenis la taskon organizi la venontan internacian pedagogian renkontiĝon (RIDEF) en Pollando.

Ĝi decidis, ke esperanto fariĝos unu el la ĉefaj laborlingvoj. Perkorespondaj Esperanto-kursoj estis proponitaj al la ĉeestontoj, kaj, ĉefe, antaŭrenkontiĝo je dek (aŭ dudek) tagoj por eklerni Esperanton aŭ perfektiĝi en la internacia lingvo.

Pli ol 20 partoprenontoj al la RIDEF komencis lerni Esperanton en la Esperanta Kulturdomo (Kastelo de Grésillon) en Francio, ankaŭ 15 aliaj tie perfektiĝis kaj ekzerciĝis antaŭ la Renkontiĝo. Kiam la Renkontiĝo komencis en Pollando, inter la 150 partoprenantoj, troviĝis pli ol 50 esperantistoj el 5 landoj.

Esperanto estis agnoskata kaj utilizata kiel laborlingvo, samrajte, kiel la franca kaj la pola, la du aliaj oficialaj lingvoj. Ĉiuj laborkunvenoj okazis en la tri lingvoj, la oficiala ĉiutaga bulteno aperis en tri eldonoj : franca, pola, esperanta Dum sia ĉiujara ĝenerala Asembleo, la FIMEM adoptis kvazaŭ unuanime (nur 4 sindetenoj) rezolucion rekomendantan Esperanton, kiel laborlingvon de la Federacio.

Antaŭ la Renkontiĝo, porkoresponda servo ebligis al multaj eksterlandaj kolegoj starigi korespondadon en esperanto ĉu personan ĉu inter iliaj respondaj klasoj.

Rediproka Gastigado-servo donis eblecon al multnombraj eksterlandaj kolegoj gasti dum certa tempo post la Renkontiĝo en polajesperantistaj familioj.

Tiele antaŭ la Renkontiĝo (per persona aŭ interlerneja korespondado), dum la Renkontiĝo (en la ĝeneralaj kunvenoj, en la laborgrupoj, en la personaj kontaktoj, dum la vizitoj, dum la ekskursoj) post la Renkontiĝo (gastado en polaj familioj, daŭra korespondado, akceptado de polaj amikoj en sia hejmo) Esperanto estis, kaj estos, realo konkreta kaj vivanta.

Tri intervjuoj far'de Radio-Varsovio multnombraj artikoloj de gazetoj polaj aŭ diverslandaj raportis pri tiu-ĉi Renkontiĝo, ĉiufoje menciante esperanto-uzadon.

Tiu Internacia Pedagogia Renkontiĝo estis, nekontesteble, grava sukceso por Esperanto. Tiu sukceso devas kreski ĉiujare : la venonta Internacia Renkontiĝo okazos en Lisbono (Portugalio) dum la 2a duono de julio 1977. Ĉiuj esperantistoj (instruistoj, profesoroj, gepatroj de lernantoj) aŭ tutsimple ĉiuj, kiuj interesiĝas pri edukaj problemoj aŭ pri inteligenta malkovro de la lando, rajtas partopreni tiun Internacian Renkontiĝon.

Sed bone pripensu tion : Skribu TUJ al Henri MENARD, LE PALLET 44330 VALLET, Francio, por ricevi ĝustatempe informojn kaj slipojn necesaj por definitiva aliĝado kaj registrado. SKRIBU TUJ. Ne restos lokoj por la lastaj, kiuj sin anoncos.

Ĝis baldaŭ en Lisbono !

Jean MARIN
Organizinto de la 9a RIDEF en Pollando

.....

SLIPO RESENDOTA TIEL RAPIDE. KIEL EBLE al Henri MENARD, LE PALLET F-44330 VALLET — Francio

S-ro, S-ino, F-ino NOMO : Antaŭnomo :

Kompleta Adreso :

Telefon-nº :

Profesio : Naskiĝdato :

Nivelo de Esperanto-scipovo : ALTA — MEZA — MALALTA

Intencas partopreni RIDEF 77 en Lisbono (Portugalio) kaj petas pli detalajn informojn.

Rimarkoj, demandoj, sugestoj :

Dato : Subskribo

TRANSDONO DE LA VIVO

La Reproduktado estas tiu eksterordinara funkcio, kiu ebligas la senĉesan renovigon de la estaĵoj. Tamen, se la reproduktado certigas la ĉiamecon de la specioj, la mortado malebligas la troloĝatecon.

Jam de la plej antikvaj tempoj, oni deziris scii kiamaniere okazas tiu reproduktado. En la 18-a jarcento oni ankoraŭ ne konis la ekziston de la reproduktantaj ĉeloj. Dum la mikroskopo ekzistis jam de la 16-a jarcento, nur en 1854, la botanikisto Thuret observis la unuan fekundigon ; ĝis tiam la scienculoj pensis, ke ĉiu besto entenas ĝermojn ; tiuj ĝermoj ankaŭ entenas ĝermojn, kiuj siavice donas ĝermojn k.t.p. ; oni kredis, ke tiuj ĝermoj devenis de la Kreado mem. Oni ankaŭ pensis, ke tiuj movemaj bestetoj trovis, sine de la femaloj, terenon favoran al sia disvolviĝo.

La mikroskopo ebligis la observadon de la spermatozoj en la maskla semo. La laboroj de Spallanzani (1729-1799) montris la ekzistadon de la fekundigo. Hodiaŭ la biologoj observis ĉiujn fazojn de la reproduktado ; eĉ ili efektivigis, en laboratorio, artefaritajn reproduktojn.

Tamen la fekundigo de ovolo fare de spermatozo estas nur unu aspekto, tre limigita, de tiu problemo ; la fenomeno ekfunkciigas ĉe maskloj kaj femaloj, specialajn kondutadojn.

La senseksa reproduktado (sen seksaj organoj)

La reproduktado ne ĉiam rezultas de fekundigo de ovolo fare de spermatozo ; ĝi povas ankaŭ rezulti aŭ de partiĝo (dupartiĝo aŭ multpartiĝo) aŭ de burĝonado.

La Unuĉeluloj estas tre simplaj organismoj konsistantaj el unu nura ĉelo entenanta unu kernon. En tiu primitiva kategorio la unuĉelaj plantoj (la « profitoj ») tre proksimas la unuĉelajn bestojn (la protozoojn) ; ili sammaniere reproduktiĝas : en la du kazoj la ĉeloj partiĝas en du partojn : estas la dupartiĝo. Oni observis la fenomenon ĉe la mikroskopo : Unue la ĉelo duobligas la nombron de siaj kromosomoj ; poste la kerno partiĝas en du kernojn ; siavice la primitiva ĉelo donas du ĉelojn ; ĉiu ĉelo kun unu kerno. Kiam la temperaturo kaj la oksigenado estas favoraj, la ritmo de la partiĝo akceliĝas laŭ geometria progresio (2-4-8-16-32 —k.t.p.) kaj la nombro de la individuoj multiĝas laŭ freneziga rapideco. Oni kalkulis, ke unu « paramecio » (eta ĉelo kun cilio, kiu vivas en dolĉakvo) povus doni, en unu monato, volumon da vivanta materio egalan al milionfoje tiu de la suno. Sed tio ekzistas nur sur la papero de la matematikistoj, ĉar la Naturo scias limigi nutraĵon kaj oksigenon. Kelkfoje la Unuĉeluloj estas danĝeraj por la homoj ; ekzemple la tripanosomo responsa je dorm-malsano kaj la ameboj inter kiuj, tiu, kiu okazigas paludismon... kaj aliaj.

La primitivaj Senvertebruloj inter kiuj la spongo, la dolĉakva hidro, la mara anemono, sen kapo kaj sen membroj, longtempe cerbumigis la zoologojn : ĉu bestoj ? ĉu plantoj ? Hodiaŭ oni ilin klasifikas inter la Metazooj, plurĉeluloj kun simpla anatomio, kaj kiuj povas reproduktiĝi partiĝe aŭ burĝone.

Ekzistas malgrandaj spongoj hirtaj je pikaĵoj ; de tempo al tempo unu pikaĵo deŝiriĝas de la patrina spongo, kunprenante malgrandan spongan amaseton ; ĝi naĝas iom pli malproksimen, dikiĝas, falas sur la fundon, alkroĉiĝas al roko : nova spongo naskiĝis ; la homoj delonge scias uzi la fenomenon : oni tranĉas spongon en malgrandajn pecojn, oni ilin palisumas sur dratojn, oni mergas la tuton en la maron. Kaj sufiĉas atendi. Kaj, kiam ĉiu peco sufiĉe dikiĝis, oni kolektas la junajn spongojn.

Kelkaj spongoj alimaniere reproduktiĝas : ili burĝonas ; dum la tuta vintro, same kiel grajnoj, tiuj burĝonoj embriece vivas malakcelan vivon ; kaj, en printempo, tiuj burĝonoj ĝermas, kaj donas junajn spongojn, kiuj deŝiriĝas de la patrina spongo. La dolĉakva hidro mezuras ĉirkaŭ unu centimetron ; se oni skuas la akvon, la besteto kunstreĉiĝas en senforman mason, kiun oni ne plu vidas ; en la akvo de akvario, ĝi, kiel floro, disfloras ĉe la vitro ; ĉe fino de ĝia piedo, kiu similas tigon, moviĝas maldikaj tentakloj, meze de kiuj troviĝas buŝo ; tiuj timindaj tentakloj kaptas la etajn dafinojn, kiuj preterpasas, kaj ilin pasigas en sian gastran kavon. La aktinio ankaŭ havas multajn tentaklojn, kiuj senĉese moviĝas por kapti la etajn fiŝojn ; ĝia urtikeca povo estas tre malagrabla al la banantoj.

Kvankam hidro kaj aktinio uzas siajn seksajn organojn por ĉiamigi sian specion, ili povas ankaŭ reproduktiĝi partiĝe aŭ burĝone. Kelkfoje oni vidas duoblan hidron sur la sama piedo ; reale estas la sama besto, kiu partiĝas laŭlonge ; ĉiu duono restarigas la mankantan parton por reformi tutan beston ; kaj la du hidroj disiĝas ĉe sia bazo. La hidro povas ankaŭ burĝoni, kiel plantoj ; ĉe certaj periodoj de la jaro, en favora temperaturo, malgrandaj ŝveloj aperas sur la piedo de la besto ; ĉiu hernio longiĝas kaj baldaŭ montras, ĉe ĝia fino, buŝon ĉirkaŭatan de fajnaj tentakloj ; tiuj ŝveloj estas la hidridoj ; kiam ili sufiĉe kreskis, ili forlasas sian patrinon kaj iras iom pli malproksimen, por siavice burĝoni. Unu hidro, kiun oni observis en laboratorio dum tri jaroj naskis 700 burĝonojn ; fine de la tria jaro la patrina hidro estis tiel aktiva kiel sia plej juna filino.

Kelkaj vermoj, kiel la « maïs » naskas ĉe sia bazo burĝonojn, kiuj deŝiriĝas de la vermo ; tiu ĉi rapide retrovas sian primitivan longon kaj daŭre burĝonas tute ne montrante lacecon.

Oni malkovris la sekreton de tiu konstanta juneco : Proksime de la buŝo kaj de la tentakloj troviĝas zono, kie la ĉelaj multobliĝoj estas intensaj ; reale, laŭmezure ke la besto kreskas, ĝi eluziĝas ĉe sia bazo ; la hidro senĉese renoviĝas. Kiam la kreskado ĉe la supro egalas la eluziĝon ĉe la bazo, la hidro restas unika ; se la kondiĉoj (temperaturo oksigenado) estas pli bonaj la kreskado superas la eluziĝon ; la burĝonado okazas kaj la hidrido deŝiriĝas de sia patrino. La nura renoviĝo de la ĉeloj certigas la senmortecon de la individuo ; la surabundo de la ĉeloj certigas la ĉiamecon de la specio. Ĉu la dolĉakva hidro inspiris la Hidron de la mitologio ?

Okazas, sed pli malofte, ke la partiĝo efektiviĝas transverse, laŭlarĝe ; ekzemple, ĉe la « Planair-oj » kaj ĉe la anelidoj. La anelidoj havas longan korpon dividitan en ringformaj segmentoj, kiuj tute similas unuj la aliajn ; ĉiu segmento entenas ekskrecian aparaton kaj reproduktantan aparaton ; tamen la digesta aparato kaj la nervosistemo estas komunaj al la tuta korpo.

La « lumbrikulus » (dolĉakva malgranda vermo, kiu ne estas la lumbriko) tute disiĝas, dissemante en la akvo ĉiujn siajn segmentojn ; ĉiu segmento redonas tutan beston : por 6 segmentoj estas 6 vermoj.

La « dodecaceria » de la Maniko multe pli bone agas : ĝiaj segmentoj ŝveliĝas ĝis iĝi sferaj ; poste la vivanta koliero disiĝas kaj ĉiu segmento donas du individuojn, dufoje seninterrompe (kio estas kvar individuoj) ; do, se unu dodecaceria entenas 6 segmentojn, ĝi donas 24 novajn vermojn. Kelkfoje la estontaj vermoj estas tute konstituitaj antaŭ la disiĝo : la « spirografo », kiu vivas en la tubo de la biologo, disvolvas sian belegan brank-faskon ; la unika besto lante transformiĝas en seninterrompan ĉenon da vermoj : la kapo de ĉiu vermo alkroĉiĝanta ĉe la vosto de la antaŭa ; dum kelka tempo la estontaj individuoj restas asociataj kun komunaj digesta tubo kaj nervosistemo ; kaj la ĉeno rompiĝas kaj ĉiu ĉenero donas vermon similan al la naskinto. La kolonio rompiĝis por doni sendependajn individuojn kiuj siavice naskos novan kolonion.

La « planair-oj » estas famaj ĉe la biologoj pro siaj mirindaj kapabloj. Longaj je apenaŭ kelkaj milimetroj, tiuj bestoj loĝas en lagetoj, rampas sur la fundo aŭ naĝas sub la surfacaĵo de la akvo. Pli evoluintaj ol hidro kaj spongo, ili tamen havas organismon ankoraŭ tre primitivan. Ili reproduktiĝas dupartiĝe : la malantaŭa parto de la vermo fiksiĝas sur subportilo dum la antaŭa parto daŭre antaŭeniras ĝis la du partoj de la korpo disiĝas ; poste la antaŭa parto rekreas al si voston dum la malantaŭa parto donas al si kapon.

Frua partiĝo

Ĉe la spongoj, la hidroj, « la planair-oj », la anelidoj, la partiĝo ĉiam okazas kiam la besto jam atingis certan maturecon.

Ĉe la seks-havantaj bestoj, pli evoluintaj, la partiĝo povas okazi ĉe la embrio : la fekundita ovo, kiu jam komencis sian evoluadon, povas disiĝi en du (aŭ pli) ĉelaĵa masojn ; ĉiu parto de la ovo iĝas embrio, kiu kreskos kaj donos perfektan individuon. Estas la fenomeno de la poli-embriogenezo, kiu asocias la seksan reproduktadon (formadon de ovo) al la partiĝo de la embrio. Oni renkontas plur-embriogenezon ĉe kelkaj insektoj himenopteroj ; tiuj ĉi demetas siajn ovojn en la korpon de la raŭpoj, kie la embrio donos plurajn embriojn. Tiuj himenopteroj, kiel multaj parazitoj, ricevis de la Naturo duoblan ŝancon por pluigi sian specion.

Pli miriga estas la fakto, ke la plurembriogenezo ekzistas ankaŭ ĉe bestoj multe pli evoluintaj ol la insektoj ; ĉe la mamuloj, la dazipo, malgranda sendentulo de Sudameriko, naskas plurajn idojn el la sama ovo, nutritajn de la sama placento ; ili estas samseksaj.

En la homa specio la plur-embriogenezo kondukas al la formado de la veraj ĝemeloj aŭ de pluraj idoj ; kvankam oni ne konas la ekzaktajn kondiĉojn de tiu poli-embriogenezo, oni pensas, ke la interveno de pluraj organizitaj centroj — anstataŭ unu nura centro — okazigas la fragmentigon de la ovo.

Cetere la scienculoj scias artefarite okazigi tiun plur-embriogenezon ĉe la ekinoj, la fiŝoj, la batrakoj kaj eĉ ĉe la mamuloj ; la specialistoj facile naskigas du musojn el unika ovo. Sufiĉas delikate fragmenti la ovon, ĉe la taŭga momento.

Regenerado

Post tiu taŭga momento, oni havas nur du duonojn de embrioj.

La Regenerado estas fenomeno preskaŭ magia.

La lombriko ne de si mem dupartiĝas. Tamen se akcidento tranĉis ĝin en du partojn, ĉiu peco kapablas rekrei la mankantan parton — kondiĉe ke la tranĉado okazis en taŭga parto de ĝia korpo. La asterio povas rekonstrui siajn tranĉitajn brakojn ; eĉ unu nura brako kapablas rekrei la tutan 5-brakan asterion. La fiŝoj, kiujn oni amputis povas regeneri siajn naĝilojn, siajn makzelojn, siajn skvamojn, siajn operkulojn, je kiuj oni ilin senigis. Kontraŭe la ranoj tute nekapablas gravan regeneradon : nur la ranidoj sukcesas rekonstrui sian voston ; ĉe la reptilioj nur la lacerto rekreas sian voston, kiun ĝi forlasis al la malamiko, kiu intencis ĝin kapti ; kaj eĉ tiu vosto ne tute similas la antaŭan.

En 1907 Wilson eksperimentis ĉe spongoj ; oni tranĉis unu spongon en tre maldikajn pecojn, kiujn oni zorge pistis ; poste oni kribris tiun ĉelan kaĉon tra silka kribrilo kun tre fajnaj maŝoj ; oni metis tiun ĉelan kaĉon en akvon ; post malmulte da tempo. amasetoj formiĝis ; ĉiu amaseto donis spongon.

Estas nur post kelkaj jaroj, ke oni sciis ekspliki la fenomenon : Kvankam dispecigita, la ĉeloj de la spongo montras grandan afinecon unuj por la aliaj ; ili grupiĝas laŭ sia esenco por formi histojn ; tiuj histoj siavice organiziĝas por redoni spongon.

Sed kiuj fortoj intervenis ? Tion oni ankoraŭ ne scias.

Senseksa reproduktado, kaj regenerado apartenas precipe al la bestoj, kies organismo estas tre primitiva. Ju pli oni supreniras laŭlonge de la genealogia besto-arbo, des pli la senseksa reproduktado malaperas kaj pli la regenerado-povo malfortiĝas. La birdoj, la mamuloj povas nur ripari histojn ostajn, glandajn, epidermajn kaj rekonstrui plumojn, harojn, ungojn ; ĉe la adoltaj superaj vertebruloj nur la ovo kapablas partiĝi.

La biologoj trovis la klarigon

La plej primitivaj senvertebruloj konservas — eĉ en sia adolta stato — stokon da embriaj ĉeloj kapablaj interveni por ripari amputon kaj por efektivigi senseksan reproduktadon (partiĝon aŭ burĝonadon). Laŭmezure ke oni alproksimiĝas al la plej evoluintaj bestoj (precipe al vertebruloj) tiu stoko da embriaj ĉeloj pli kaj pli malgrandiĝas por fine ebligi nur riparon de negravaj damaĝoj. La bestoj diritaj Superaj eluzas la preskaŭ totalon de siaj konstruantaj ĉeloj dum la embria ellaborado de siaj organismoj.

Dum la primitivaj bestoj, kapablaj je senĉesa regenerado, teorie estas senmortaj kaj eterne junaj (hidro), la bestoj supere organizitaj jam uzis ĉiujn siajn kreantajn ĉelojn, kiam ili naskiĝas. Ili naskiĝas kvazaŭ « maljunaj » ; ĉar ili ne sciis konservi sufiĉan stokon da anstataŭaj ĉeloj, ili estas kondamnitaj al neevitebla morto.

Kontraŭparto de la alta evoluado-grado, kiun ili atingis.

El la teksto de B. Gaudin.

El la Mil kaj unu Noktoj

HISTORIO DE LA MALGRANDA ĝIBULO

Estis iam, en Gascar, ĉe la ekstremaĵo de la Granda Tartario, tajloro, kiu havis tre belan edzinon, kiun li ege amis, kaj kiu same ege amis lin. Iun tagon, dum li estis laboranta en sia budo, malgranda ĝibulo sidiĝis ĉe la sojlo kaj, ludante tambureton, komencis kanti. Tuj la tajloro pensis : jen por gajigi mian edzinon ! Kaj li kondukis la ĝibulon en sian hejmon. La virino preparis tre bongustan fiŝon. Ho ! Ve ! manĝante, la ĝibulo glutas fiŝoston kaj tuj mortas. Antaŭ tiu akcidento, la geedzoj timiĝas : ĉu oni punos ilin kiel krimulojn ? La edzo pripensas kaj subite memoras, ke juda kuracisto loĝas sur la unua etaĝo de najbara domo. Ili prenas la ĝibulon, unu per la piedoj, la alia sub la ŝultroj kaj portas lin ĝis la pordo de la juda kuracisto. Li ekfrapas Servistino brue malsupreniras, sen lumo, la ŝtuparon kaj malfermas la pordon. « Rapide resupreniru, diras la tajloro, kaj avertu vian mastron, ke tiu viro estas tre grave malsana ». La servistino resupreniras. Dume tajloro kaj edzino, kiel eble, plej rapide, portas la ĝibulon supren. Kaj ankoraŭ pli rapide, ili forkuras hejmen. Dume, la servistino ĉion klarigas al la kuracisto. kiu, dum ŝi preparas lampon, tuj paŝas al la ŝtuparo, sed, pro la obskureco, li ekfrapas la korpon de la ĝibulo, kiu ruliĝas ĝis malsupre. Finfine la servistino alportas la lampon kaj la kuracisto konstatas, ke la viro estas morta. « Kia malfeliĉo ! mi mortigis tiun malsanulon ! ĉar mi estas kulpa je tiu morto, certe oni konsideros min kiel krimulon ! ». La edzino de la kuracisto preskaŭ svenas, kiam ŝi ekscias tiun okazaĵon.

Sed baldaŭ ideo venas al ŝi : « Ni portu tiun kadavron sur nian terason kaj ni ĵetu lin en la domon de nia muzulmana najbaro ». Tiu muzulmano estis la provizisto de la Sultano al kiu li liveris buteron, oleon kaj grasojn ; en lia magazeno, musoj kaj ratoj grand-damaĝe festenis. La juda kuracisto kaj lia edzino portas la ĝibulon sur la terason kaj helpe de ŝnuroj, malsuprenirigas lin en la kamenon, tiel delikate, ke li restis staranta ĉe la muro. kvazaŭ li estus vivanta. La geedzoj resuprenirigas la ŝnurojn kaj enfermiĝas en sian hejmon.

Iom pli poste la provizisto revenas de nupta festeno kie drinkadoj ne mankis. Li tre miras, kiam, ĉe la lumeto de sia lanterno, li ekvidas viron starantan en lia kameno. Li ekkoleras : « Ha ! ha ! fripono ! ne estas la musoj, kiuj manĝas mian oleon kaj grasojn ! Estu certa ke ci ne revenos ! ». Kaj per dika bastono li frapas. frapadas, ĝis la ĝibulo falas teren. Subite la provizisto konscias, ke la fripono ne plu moviĝas. Li de pli proksime rigardas kaj konstatas, ke la viro estas morta. « Ho ! kion mi faris ! mi batmortigis tiun ĉi por iom da oleo kaj graso ! Kaj la murdintoj estas pendumitaj ! ». Li tuj ŝarĝas la kadavron sur siajn ŝultrojn, eliras el sia domo kaj iras ĝis la stratangulo ; li apogas la ĝibulon ĉe budo kaj rapidas hejmen, tute ne rigardante malantaŭ sin.

La nokto preskaŭ finiĝis. Baldaŭ la muezino vokos la muzulmanojn por la preĝejoj. Tre riĉa kristana komercisto, kiu, ankaŭ li, liveras varojn al la Sultano, ĵus eliris el dibočejo ; kvankam ankoraŭ ebria, li direktiĝas al la banejo ; tamen li rapidas ĉar li timas, ke la muzulmanoj vidante ebriulon, lin konduku al la policejo ; ĉe la stratangulo li haltas, por nepra bezono, ĉe la budo, kie staras la ĝibulo, kiun li ne vidas. Subite tiu ĉi falas sur la dorson de la kristana komercisto, kiu tuj pensas pri ŝtelisto. Li energie pugnofrapas lian atakanton kaj samtempe krias : « Helpon ! ŝtel ! ŝtel ! ». La kvartala gardisto alkuras kaj kliniĝas super la pugnofrapito, kiu kuŝas tere, Kaj severe diras : « Mi ĉion komprenas ; vi estas kristano, kiu mortigis muzulmanon ! Ek ! al la policejo ! ». La polic-leŭtenanto demandas la akuziton kiu tute ne komprenas kiel du-tri pugnobatoj okazigis tiun morton.

Oni sciigas la Sultanon pri tiu evento. Senkompate li decidas : « Oni pendumu lin ! ». Oni starigas la pendumilon kaj la kriistoj anoncas en la tuta urbo, ke krimulo estos pendumita. Oni elirigas la kristanan komerciston el lia ĉelo kaj oni lin kondukas ĝis piedo de la pendumilo La ekzekutisto metas la ŝnuron ĉirkaŭ lian kolon ; li prepariĝas por tiri la ŝnuron, kiam iu krias : « atendu ! atendu ! ne rapidu ! li ne estas kulpa ! la kulpulo estas mi » ! Estas la muzulmana provizisto, kiu, ŝoviĝanta tra la popolamaso, alkuras ĝis la pendumilo. La polic-leŭtenanto demandas la proviziston, kiu rakontas kiamaniere li trovis la ĝibulon en sia kameno, lin bastonadis, kaj lin portis ĝis la stratangulo, kie lin trovis la kristana komercisto ; « Ne mortigu tiun senkulpulon ! mi ne volas ŝarĝi mian konsciencon per dua murdo ! ».

« Ellasu la kristanon, diras la leŭtenanto al la ekzekutisto, kaj pendumu la veran kulpulon ! ». La ekzekutisto reprenas sian ŝnuron kaj aranĝas ĉirkaŭ la kolon de la muzulmano.

Sed subite alkuras la juda kuracisto : « Sinjoro, tiu muzulmano, kiun vi volas pendumi ne estas kulpa. Nur mi estas la vera krimulo ». Kaj li rakontas, kiel, en obskureco, li ruligis la ĝibulon ĝis piedo de la ŝtuparo kaj kiel li malsuprenirigis la kadavron en la kamenon de sia najbaro.

La juda kuracisto havis jam la ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, kaj prepariĝis por morti, kiam oni aŭdis la voĉon de la tajloro : « Haltu ! Haltu !, li estas senkulpa ! ». Kaj li longe rakontas la viziton de la ĝibulo, lian kanton, la bonan fiŝmanĝon kaj la morton de la vizitanto ; kaj kiamaniere lia edzino kaj li portis la kadavron ĉe la kuraciston. « Liberigu la judan kuraciston, kaj pendumu min, la veran kulpulon ! ».

La ekzekutisto kaj ĉiuj spektantoj mirigitaj ekkriis : Kia historio !

La ekzekutisto liberigas la kuraciston kaj ligas la ŝnuron ĉirkaŭ la kolon de la tajloro. Li komencas tiri la ŝnuron, kiam Sendito de la Sultano alvenas. Li krias : « Haltu ! haltu, la Sultano volas vidi ĉiujn akuzitojn. Li volas ankaŭ, ke oni alportu al li la kadavron de la ĝibulo, car li estas lia plej amata amuzisto ».

Kaj oni kondukas ĉiujn antaŭ la Sultanon.

Kun la Sultano troviĝas Barbiro ; tiu ĉi multe vojaĝis kaj scias mirindajn rakontojn, la historio de la ĝibulo multe interesas lin. Li atente aŭskultas tiun rakonton alproksimiĝas al la ĝibulo, sidiĝas apud lin kaj metas lian kapon sur siajn genuojn ; li atente rigardas lin kaj subite ekridegas : « Via Reĝa Moŝto, tiu ĝibulo ne estas morta ; li ankoraŭ vivas ! ». Dirante tiujn vortojn, li malfermas sian medikamentujon, elprenas boteleton. kaj longe frotas la kolon de la malfeliĉulo ; malferminte lian buŝon, li enigas en lian gorĝon etan pinĉileton kaj eltiras la fiŝoston, kiun li montras al ĉiuj. Tuj la ĝibulo ternas, etendas la brakojn kaj la gambojn, malfermas la okulojn kaj stariĝas. Ĝojege la Sultano ordonas, ke tiu historio estu transskribita, por ke oni neniam ĝin forgesu. Al la tajloro, al la juda kuracisto al la muzulmana provizisto, al la kristana komercisto li donacas riĉan robon, kiun ili devas tuj surmeti. La Barbiro ricevas gravan pensian kotizon kaj daŭre restos. kiel konsilisto apud la Sultano.

« Eta amata virino, kun parfumo de verbeno »...

Certe estis insulto al ilia mizero... certe tio ĉi povus puŝi al murdo Hildesheim kaj Bobby Moss...

Sed, la triobla suno de la lampoj, la furioza rigardo de Cavendish, la mastro de tiu trinkejo « La Sorĉa Situo », la aĉa nokto, kiu gvatis ĉe la vitroj, kaj la varmeta oro de la viskio igis ilin malbravaj...

Kaj, malbravaj, ili ridetis al tiuj festantoj en smokingoj kaj en ĉemizoj el neĝeca silko.

Tiuj ĉi, kun palegaj vizaĝoj, estis viroj malgrandaj, kiuj odoris la francajn parfumojn kaj la dentan karion La virinoj, kiuj ilin akompanis, estis tre belaj ; la blanka beleco de iliaj ŝultroj kaj brakoj radiis en la volupta ombro de la peltoj — ofende riĉaj. Juveloj lumiĝis en ĉiu kavo de ilia karno. Kaj iliaj naŭzaj amikoj havis pezajn biletujojn similajn al dikaj malgrandaj volumoj, bindita je venecia ledo aŭ je griza lacerto-haŭto.

Sed, de ok tagoj, Cavendish verŝis viskion — kredite — al Hildesheim kaj Bobby Moss, la du malbonaj knaboj ; tial, sur ili, lia potenco estis granda.

Hildesheim estis batalinta kontraŭ hundoj Labrador reirintaj al sovaĝa stato ; inter siaj manoj li estis triturinta ilian ferecan kranion kiel sangan argilon. Bobby Moss rakontis, ke — tute sola — li estis haltiginta ribelon de Negroj en Ĉad-ĝangalo ; kaj Bobby Moss ne estis mensogulo.

Nu, ambaŭ ekridis, kiel bonaj knaboj, kiam unu el tiuj Sinjoroj ĵetis flamantajn alumetojn en iliajn harojn ; la hararaĉo de Hildesheim, kiu estis grasa sendis longan ĵeton da fetora fumo al la plafono ; kaj ĉiuj ridegis, kiam perlamota veziketo leviĝis sur la mentono de Bobby.

Hildesheim kaj Bobby ridis ĝis larmoj ; ilia ĝojo estis profunda.

Sed tiuj, kiuj bone konis ilian rigardon, sciis, ke, jam, ili estis ekster la trinkejo, ke ili estis ie en la hantata haveno, ke ilia rido, jam eskapinta el la nuna momento, vojiris en nekonata dimensio, en la estonteco.

Kaj tiu estonteco, plena je reĝa ĝojo por Hildesheim kaj Bobby, leviĝos kelkajn horojn pli poste, kiam la ŝutroj estos fermintaj siajn palpebrojn sur la rozaj fenestroj de la trinkejo ; kiam la luno, ruĝa kaj laca, rulos laŭ la jardoj kaj la strečitaj ŝnuraroj.

La ĵazo ludis murdajn ariojn. La viskio, kiun oni longglute trinkis, malavare ĉar estis la festantaro, kiu pagis, havis guston de kupro aŭ sango. La nadloj de la murhorloĝo, kun firmaj movoj de falĉantoj, ironie antaŭeniris al la momento de la fermo-horo.

Bobby Moss estis provinta la eĝon de sia tranĉilo sur sia ungo. Hildesheim kantis !... Hildesheim kantis ! Estis hurlado, kiu ne sukcesis eliri el lia gorĝo : ia sovaĝa raŭkiĝado, ia rumoro de malproksima uragano, la eĥo de la tempesto, kiu muĝis en lia koro.

— Sinjorinoj, Sinjoroj, diris Cavendish, mi bedaŭras, sed estas la fermo-horo. La ĵazo silentiĝis. La kariljono de la murhorloĝo ĵetis la lamentadon de la Westminster sonoriloj. Terura silento ŝvebis.

— Ha ! diris Hildesheim.

— Ha ! diris Bobby Moss.

Tiam la festantoj sentis la morton.

El la timigita grupo, subite malebriigita, virino leviĝis ; ŝia supla korpo drapiriĝis en mantelo el talpofelo ; en ŝiaj okuloj, mirinde malvokoloraj lunradioj glimis ; ŝi prenis la grasan manon de Cavendish,

— Sinjoro, ŝi petegis, ankoraŭ unu minuton...

— Estas la horo, respondis Cavendish, la polico estas severa...

— Mi estas Dolly Natchinson, de Covent Garden, kaj mi volus kanti por tiuj du sinjoroj...

— Dolly, kriis unu el tiuj hidaj manekenoj, mi malpermesas al vi...

— Vi havas nenian rajton por ion ajn malpermesi al mi, Sro Stappleby, kaj mi ne permesas al vi nomi min Dolly. Kaj tuj ŝi ekkantis.

Estis la kanto de Butterfly, kiu kantas sian malesperon de forlasita virino :

« Eta amata virino kun parfumo de verbeno... ».

Kaj, el ŝiaj longaj malvaj okuloj, larmoj elfluis.

Kiam la pordo malfermiĝis malantaŭ la festantaro Bobby Moss leviĝis ;

— Restu, diris Hildesheim ;

— Bone, respondis Bobby ;

Cavendish metis la ŝutrojn kaj fermis la pordon. Li ne ordonis, ke ili foriru ; kontraŭe li denove plenigis ilian glason per viskio fama, blonda, plena je flamoj kaj revoj...

La festantoj estis savitaj. Kial ?

Ĉu pro la magio de la muziko ? de tiu voĉo ? de tiuj malvaj okuloj ?

Ne, tiaj knabegoj ne emociiĝas pro tiuj beletaj sentimentalaĵoj. Se la artistino estus kantita Werther, Lohengrin aŭ ĉion alian, la sorto de tiu trupo da stultuloj, vojerarintaj pro freneza aŭdaco en tiu marista trinkejo, estus drame finiĝanta.

Sed ŝi kantis Butterfly kaj, certe, ŝi estis inspirita de Dio mem ; kaj nur tial oni povas kompreni la subitan indulgon de tiuj du piratoj, kies mizeron insultis la lukso kaj la ĝojo de la aliaj.

Ĉu la elvoko de gejŝo en larmoj — kiu igis malgranda, malgranda... malgranda sur la rustiĝinta ĝetkajo, dum la vaporŝipo haste fuĝis for el la mirinda rodo — alportis helpon al la elvokantino, en tiu horo ? en tiu horo tiel proksima de la murdo.

Aŭ ĉu alkuris ĉiuj niaj malfeliĉaj havenaj amikinoj ?

La Hispanino de Las Palmas, kiu petis de ni preĝoin por sia amanto, fiŝisto de Madejro, kiam Atlantiko hurlis kiel lupino. La bona knabino de Marsejlo, kiu, post la brulaj momentoj de la amoro, volis revigligi nian ardon per alloga fiŝosupo, spicita kiel fajro.

La junulino de Southampton, kiu kredis, ke ni alportis el Oriento magiajn receptojn kapablajn kuraci malsanon kulturitan de kvin damnitaj generacioj ; kaj tiun malfeliĉulinon ni pagis per groteskaj formuloj kaj sekigitaj algopecoj.

La Holandanino kun pezaj mamoj, kiu, per ligno-ŝuaj frapoj, venĝis sin kontraŭ la avareco de la mizeraj vagantoj, kiuj ni estis.

La blonda virino de Bergen, kies anĝela rigardo ignoris ĉiujn erarojn de ŝia korpo.

La judino de Hamburgo, kiu, fordonante sin al niaj krudaj deziroj, murmuris longan preĝon en hebrea lingvo

La stranga belulino de Honfleur, kiu postulis la tutan nokton ĉirkaŭ niaj kisoj.

La hetajro de Kairo, kiu parfumis niajn korpojn per benzoo.

La kreolino de Rio, kiu ritmis la forgesigajn minutojn per unu stranga kanto de la pampoj.

La povrulineto de Ikuike, kiu neniam riproĉis al ni la krudajn odorojn de nitratoj kaj guano, kiujn ni alportis en ŝian kuŝejon.

La adorinda insulanino de Papeete, kiu volis ne monon sed la novajn kantojn de Francujo kaj Britujo.

Ĉiuj, certe, ĉiuj alkuris sur la mistera vojo de la memoro por savi la elvokantinon de ilia eterna mizero ; la eterna mizero de forlasitaj virinoj.


Kaj firme, kiel mi kredas je Dio, mi kredas je la fantoma gesto de tiuj amantinoj protektantaj la junan virinon kun malvaj okuloj, kiu tiel mirinde kantis la grandegan malesperon de la havenaj knabinoj, iun vesperon, en la trinkejo « la Sorĉa Situo ».

El la libro « La Rakontoj de la Viskio »
de Jean Ray.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvortoj



NOVAJ PROBLEMOJ

La patrino de la simio. — Ŝnuro pendis ambaŭflanke de pulio ; ĉe unu ekstremo estis alligita pezilo kaj ĉe la alia ekstremo simio sampeza. Ĉiu futo de la ŝnuro pezas kvar uncojn ; la aĝo de la simio plus la aĝo de la patrino egalvaloras kvar jarojn ; la pezo de la simio estas tiom da pundoj, kiom da jaroj estas la aĝo de la patrino ; la patrino estis duoble pli aĝa ol la simio estis kiam la patrino havis la duonon de la aĝo, kiun la simio havos, kiam li estos trifoje pli aĝa ol la patrino estis, kiam ŝi estis trifoje pli aĝa ol la simio. La pezo de la pezilo kaj la pezo de la ŝnuro estis la duono de la diferenco inter la pezo de la pezilo kaj la pezo de la simio Kiom longa estis la ŝnuro ?

La koloraj ovoj. — Patro preparis dudek kvar Paskajn Ovojn por siaj tri filoj. Ok estis bluaj kaj entenis po kvin frankoj ; ok estis ruĝaj kun po tri frankoj ; ok estis flavaj kun po unu franko. Ĉiu knabo trovis trikoloran linion el ok ovoj sur la tablo kaj ĉiu el ili ricevis la saman sumon. Kiamaniere la patro disdonis la ovojn ?

HISTORIETOJ

Supereco

Vojaĝante en Nevada, malmodesta Teksasano iom ofendas, per vanteco, la vakerojn. Kion ajn oni montras al li : ĉevalon bovon, « rancon », ĉiam li respondas : « Ĉe mi, en Teksas, ili estas multe pli grandaj » !

Finfine sufiĉas ! la vakeroj decidas fari al li farson.

En lia lito, ili kaŝas du-tri testudojn. Vespere ili akompanas lin al lia ĉambro. Antaŭ la testudoj, kiuj eliras el sub la littuko, la vakeroj ekkrias « He, ne timu, estas la cimoj de Nevada ! ».

Plej trankvile la Teksasano respondas :

« Ho ! la malfeliĉaj bestetoj ! Sendube, ili ĵus naskiĝis ! ».

Ĉe varmeto de ina sino

Estas en kamparo. Maljuna kuracisto, je meznokto, estas vokita de nobela vidvino, kiu malvarmumis.

La Sinjorino estas en sia dolĉemola lito. La kuracisto, duondormanta apogas sian orelon ĉe la magra brusto ; li diras : « malrapide nombru : unu, du, tri... ».

La malsanulino obeas

Subite la praktikisto, kiun la varmeto de la ĉambro senkonsciiĝis, vekiĝas. Li aŭdas sian klientinon kiu murmuras per premita voĉo : « Kvar mil, du cent, sep dek, ok — kvarmil ducent sepdek naŭ... ».

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PREFIKSIĜO DE RADIKOJ

Kelkaj Radikoj, uzataj kiel Prefiksoj, formas novan vorton kun. **Speciala Senco.**

Dikfingro ne estas dika fingro, sed Polekso.

Junedzo ne estas juna viro sed ĵus edziĝinta viro.

Rapidvagonaro ne nur rapidas, sed haltas nur en kelkaj stacioj.

Etbieno, etindustrio montras malgrandan amplekson de la kategorio.

Grandsinjoro, ĝentilhomo montras altrangan homon.

Mezepoko, mezeŭropo, orientazio, nordfrancujo, suditalio : montras precizan tempon aŭ regionon.

Plenmano, plenbuŝo : montras proksimuman kvanton.

Vicdelegito montras subulon.

Sovaĝfloro estas kampa floro.

Elreviĝo




— Nia najbara junedzo ŝajnas tre amanta ; ĉiun matenon li kisas sian edzinon antaŭ ol foriri.

— Kial vi ne same agas ?


— Sed, Berta, mi apenaŭ konas tiun junan sinjorinon.

Problemo por matematikistoj



Konsiderante ke tiu rapidvagonaro haltos nur en Romo, konsiderante ke tiu somnanbulo same rapide marŝos, je kiu rapideco devas veturi tiu trajno por ke la aerblovo okazigita de la trajno-kurado kompensu tiun de la somnanbulo ?

Grandtalentulo



Certe, paĉjo estas grandtalentulo, sed ŝajnas al mi, ke li iom tro fidas sian talenton.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, nº 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1976, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'été est bientôt fini. La saison à Grésillon s'est terminée le 9 septembre après un séjour de six jours de responsables de l'ICEM. Commencée dans la chaleur elle a connu une fin assez fraîche.

Succès des cours (et des élèves aux examens), succès des conférences, tel est le bilan sur le plan culturel. On peut cependant regretter que certains participants français n'aient pas toujours fait l'effort de parler la langue internationale au moins en présence des étrangers. L'effort à faire n'est pas grand et chacun en retirerait le plus grand profit. Le phénomène a été sensible au premier stage sans doute parce que le nombre des participants était très grand et aussi, peut être, à cause de l'intense chaleur qui invitait plus au farniente qu'à l'effort. Les amis qui séjournent au château sont pourtant pleins de bonne volonté et aident au maximum. Il est dommage cependant que des initiatives soient parfois prises sans que les responsables des stages en soient avisés, que nous constations que des « travaux » ont été entrepris qui vont à l'encontre des décisions ou des désirs du conseil d'administration. Bien sûr il y a beaucoup à faire, dans le bois en particulier. Mais pourquoi ne pas demander dans quel domaine agir avant de se mettre à l'ouvrage ? C'est le seul moyen de participer à un plan d'ensemble et non pas de se livrer à un travail ponctuel peut être sans lendemain.

Le nombre de participants a été satisfaisant pendant tout l'été avec une pointe de 140 en juillet. Le résultat financier sera donc très convenable. Un compte d'exploitation provisoire sera présenté à la réunion d'octobre du conseil d'administration.

Nous espérons que les travaux prévus vont pouvoir commencer dans la dernière semaine de septembre. Ils devraient permettre de terminer l'aménagement du premier étage du château et de rénover l'escalier menant au second étage. Une nouvelle étape aura été franchie qui marquera le 25e anniversaire de l'ouverture du château aux esperantistes.

P. BABIN.

Succès aux examens

Atesto pri lernado :

Bourrely Mireille, Bourrely Sylvaine, Coutin Muriel, Delahayes Gilbert, Drabs Hubert, Felix Jeannine, Gonin Jacqueline, Grela Marie, Grela Albert, Guillot Hélène, Le Mercier Jeanne, Pauwels Dalila, Scicluna Antoine, Thibé-Wildschütz Josephine, Vanoverschelde Evelyne, Vermeere Pierre.

Atesto pri Praktika Lernado :

Coquin Roger, Coutin Muriel, Drabs Hubert, Duran Josefa, Goudin Marie-Benedicte, Goudin Georges, Guidon Angèle, Lachaize Solange, Zilko Aline.

A tous nos bien sincères félicitations.

Nous n'avons pas encore les résultats de l'Atesto pri Kapableco ni ceux du Pedagogia Atesto.

LA REVUE

Peu nombreux sont les amis qui n'ont pas payé leur abonnement 1976. Nous leur demandons cependant instamment de se mettre en règle rapidement, ou en tout cas avant la fin de l'année, ceci pour éviter des rappels désagréables autant pour nous que pour eux. Les retardataires 1976 peuvent devenir les premiers abonnés 1977. Il leur suffit de régler les deux années d'abonnement à la fois : gain de temps et simplification du travail des uns et des autres ! Merci.

NOS PEINES

Nous apprenons le décès de la fille de M. et Mme Melo, bien connue comme ses parents, des amis de Grésillon. Que nos amis Melo veuillent bien trouver ici l'expression de toute notre sympathie, à l'occasion de cette dure épreuve.

Abonnements bienfaiteurs (suite)

M, Bossard (44)	30
M. Degrelle (54)	50
M. Gracia (66)	30
Mme Micard (53)	60
M. Goudin (91)	30
M. Tailpied (14)	30
Mlle Duffrène (69)	30
Mme Bascou (07)	30
M. Sarrut (48)	30
Mlle Drillien (71)	30
M. Le Mercier (29)	30
M. Poisson (37)	30
Mlle Déjean (82)	30
Mme Lenel (22)	30
Mlle Guidou (60)	30
M. Benaïm (47)	30
Mme Chassiau (10)	60
M. Labatte (80)	30
Mlle Martinot (10)	30
Mlle Bourrot (10)	30
Mme Brissot (06)	30
Sino Schmid (All. Féd.)	30
M. Le Magadure (56)	30
M. Babin (44)	30
Mlle Turbillon (37)	30
M. Lahaye (10)	30
Mme Dupont (Belgique)	30
Mme Charraz (42)	30
Mlle Bourreley (13)	30
Sino Plazotta (Autriche)	50
Sro Schütt (All. Féd.)	100
M. Ribot (47)	30
Sino Boe (Norvège)	60
Mme Brémont (49)	30
Mlle Vanneau (75)	30
Sro Thibé (Belgique)	30
Total	**1 280**

PROFITEZ DES LONGUES VEILLEES D'HIVER

POUR PERFECTIONNER VOS CONNAISSANCES EN

ESPERANTO

AVEC NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

ET PAR LA LECTURE

ADRESEZ-VOUS A NOTRE

LIBRO — SERVO

- COURS SUR DISQUES
- MANUELS
- LIVRES DIVERS

LE GRAND DICTIONNAIRE **ESPERANTO - FRANÇAIS**

De G. WARINGHIEN

EST REEDITE, avec supplément

50,00 frs à notre Libro - Servo

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin
Prix : 10,00 Fr.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

... aujourd'hui

des livres d'étude

NI PAROLU EN ESPERANTO,
en 12 leçons + corrigés : 6 frs.

DICTIONNAIRE FRANÇAIS-ESPERANTO,
par Léger-Albault : **23 frs.**

COURS D'ESPERANTO « TRA LA MONDO »
6 disques microsillons et 7 livres
pour francophones et anglophones
(le préciser à la commande) : 86.70 frs